

Pli ol kvindek Jaroj dediĉitaj al klasika ĵazo

Ekde la fondiĝo en 1953 la

"BARRELHOUSE JAZZBAND"

estas seninterrompe aktiva kaj la internacie plej renoma tradicia ĵazbando el Germanio.

Elstaras koncertvojaĝoj al pli ol **50 landoj**, koncertoj kun pli ol 100 eminentaj ĵaz-historie influhavaj **gastsolitoj**, kaj la partopreno en multaj grandaj **ĵaz-festivaloj** – jam 1968 en la unua Internacia Festivalo de **New Orleans**, kie la orkestro ricevis la **honoran civitanecon** de la naskiĝurbo de l' ĵazo.

Haveblas pli ol tridek diversaj longludaj **diskoj**, respektive kompakt-diskoj, kiuj reprezentas la muzikan evoluon de la orkestro. En 1977 la bando ricevis la disko-premion de la "Deutsche Phono-Akademie". Komento de la jurio:

"Inteligentega tradicia ĵazo - vivoplena - klera muziko - samtempe ĉiam bele aŭtentika."

La ĵaz-pioniro **Eubie Blake** skribis aŭskultinte la orkestron en Hago dum la Nordmara Ĵaz-festivalo, en 1978: *"Ĉio kion mi skribas venas el la fundo de mia koro. Tio estas laŭ mi unu el la plej bonaj malgrandaj orkestroj, kiujn mi iam aŭdis. Kaj mi aŭskultadas ĵazbandojn ekde 1902."*

Okaze de la kvardeka jubileo en la jaro 1993 aperis '**Das Barrelhouse Buch**' (La Barrelhouse libro), en kiu la eminenta ĵaz-aŭtoro W. Sandner konstatis:

"La Barrelhouse Jazzband-anoj muzikas el plena koro kaj kun vigla intelekto. Kiam ili retiriĝos, ili meritos monumenton. Nuntempe ili mem starigas monumenton por la tradicia ĵazo."

En 2003 la "Barrelhouse Jazzband" festis sian **50-jaran jubileon**.

La urbeŝtaro de Frankfurto – hejmurbo de la orkestro – honoris la membrojn en la imperiestra salono de la urbodomo - krome aperis la luksa '**mult-media pakajo**' "BARRELHOUSE NOW!", konsistanta el aŭda KD kaj enhavorica KD-ROM kun tekstoj, bildoj, filmoj kaj muziko el la 50-jara historio.

Sekvis pluraj KD-oj. En la jaro 2010 laste aperis la **DVD**:

"Barrelhouse Jazzband *Live in Concert*" – kun la usona kantistino Harriet Lewis.

La orkestro prezentas ne nur programoj dediĉataj al herooj de klasika ĵazo, sed ankaŭ koncertojn konsistantajn ekskluzive el **propre komponitaj verkoj**.

**La koncert-programerojn sprite anonciĝas laŭbezone en diversaj naciaj lingvoj
aŭ en la internacia lingvo
ESPERANTO.**

www.barrelhouse-jazzband.de